# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Oktobro : 4 2022

## VERDIKTO KALKULAS LA KULPECON LAŬ PROCENTOJ

En la monato majo 2018, usona junulo stiris TESLA-aŭtomobilon, la maŝino kapablis adapti sian rapidecon al la kondiĉoj de la vojo kaj la trafik-signaloj. Ene de kurbo, kie la rapideco estas limigita je 40 kmoj/horo (25 mejloj/h), la aŭtomobilo atingis 187 kmojn/h (116 m/h). Tio kaŭzis akcidenton kaj pro tio, la stiranto kaj akompananto mortis.

La patro de la junulo plendis ĉe tribunalo kontraŭ la aŭtomobil-kompanio, pro la fakto, ke la veturilo devis limigi sian rapidecon. Post juĝa esplorado oni sciis, ke la junulo petis al teknikisto de la kompanio nuligi la rapidec-limigilon de la maŝino. Pri tio la patro, kiu estis la leĝa propietulo de la aŭtomobilo nenion sciis. Du monatoj antaŭ la akcidento, la junulo ricevis fortan monpunon, pro la fakto, ke li stiris tiun aŭtombilon je 180 kmoj/h (112 m/h). Tial, lia patro kontaktis kun la kompanio TESLA por instali ene de la aŭtomobilo rapidec-limigilon. Kiel dirite, poste, la junulo petis al la kompanio malinstali ĝin, tamen pri tio la patro neniam estis informita.



Post juĝa proceso, ĵurio sciigis pri kiu estis la kulpanto(j) kaj cele al tio oni uzis procentajn kalkulojn. Tiel, laŭ la verdikto, TESLA-kompanio kulpas pri la akcidento nur en la nombro de 1%; la patro, kaj propietulo de la veturilo, en la nombro de 9% kaj fine la junulo, kiu stiris la aŭtomobilon, 90%.

La ĵurio decidis, ke la ĉefa respondeculo, kaj kulpulo okaze de la akcidento, estis la stiranto mem, kiu direktis la aŭtomobilon je rapideco tro alta, krome, pro lia peto, oni nuligis la rapidec-limigilon. Pli malgranda respondeco apartenas al la patro, kiu ne nur devis instali tiun limigilon, sed ankaŭ eviti la stiradon de la veturilo fare de la junulo. Fine la kompanio iomete respondecas, pro la fakto, ke oni devis nuligi la limigilon nur se la propietulo tion petis.

# Vorto de la Semajno

## Aŭtor-rajtoj

Rajtoj, kiujn ĝuas la kreintoj de tekstoj, artverkoj kaj similaj pri la ekspluatado de tiuj verkoj.

Sinonimo: *Tantiemo.*

Autor-rajtoj (aŭ autorrajtoj) estas internacie protektitaj de la Konvencio de Berno por la Protekto de Literaturaj kaj Artaj Verkoj, subskribita la 9-an de septembro 1886. Ĉi tiu traktato estis la unua kiu rekonis la aŭtor-rajtojn inter suverenaj ŝtatoj.

Aŭtor-rajtoj havas du komponantojn:

• la **ekonomiaj rajtoj de la verko**. Temas pri posedaj rajtoj de la verkisto, ili estas limigitaj en la tempo kaj la posedanto de la aŭtor-rajtoj povas transigi ilin al aliaj personoj, do, temas pri ajna alia posedaĵo. Ili intencas ebligi, ke la aŭtoro, aŭ la tenanto de tiuj rajtoj, profitu finance el la kreaĵo.

• La **moralaj rajtoj de la aŭtoro**. Temas pri la konstanta agnosko de la kreanto kiel aŭtoro de tiu verkaĵo. Do, temas pri persona rajto de la aŭtoro kiu ne povas esti transigita al alia persono, kvankam oni povas rezigni pri tiu rajto. Laŭ ĉi tiu rajto, la aŭtoro rajtas malakcepti distordon aŭ mutilon de verko kiu povus esti damaĝa al honoro aŭ reputacio de la aŭtoro. La moralaj rajtoj de la aŭtoro estas porĉiamaj.

*Unu el la plej gravaj diferencoj inter Volapuko kaj Esperanto estas la afero pri aŭtor-rajtoj. Tiel, Schleyer neniam rezignis esti konsiderata kiel propietulo de Volapuko, tamen Zamenhof ekde la unua momento, diskonigis sian rezignon pri kia ajn proprieteco de Esperanto.*




Ni jam komencis redakti novan numeron de

***JURA TRIBUNO INTERNACIA***

Ĉu Vi deziras kunlabori en la revuo pere de artikolo, eseo, informo ktp?

Ek! La jura revuo en esperanto ankaŭ estas via revuo!

Kontaktu kun: jurista@esperanto.ac